

Heinrich Heine, Frühlingsbotschaft	Heinrich Heine, Softe vibras tra l'anim'	Heinrich Heine, Milde fluas tra la kor'	Heinrich Heine, Printempa saluto
	<i>tradukita de Kálmán Kalocsay</i>	<i>tradukita de Valentin Melnikov</i>	<i>tradukita de Ludwig Emil Meier</i>
Leise zieht durch mein Gemüt Liebliches Geläute Klinge, kleines Frühlingslied, Kling hinaus ins Weite.	Softe vibras tra l'anim' melodi' tenera, flugu al la malprok- sim', kanto primavera!	Milde fluas tra la kor' kanto primavera. Flugu, melodi- sonor', en la vast' aera.	Iras ĉarma sonoret' Tra de mi animon. Sonu printempo kan- tet' En la malproksimon!
Kling hinaus, bis an das Haus, Wo die Blumen sprießen, Wenn du eine Rose schaust, Sag, ich laß sie grüßen.	Flugu al florbeda dom', kaj se tie ĉarme ridos roz', en mia nom' ŝin salutu varme.	Flugu longe, sen ri- poz', super domoj flutu. Se troviĝos tie roz' – ĝin de mi salutu.	Ĝis la dom' forsonu vi, Kie floroj pendas! Diru al la roz', ke mi Saluteton sendas.
...	...	...	...

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17).

Arg-527-1043 (2010-03-14 15:54:47)

Tiu ĉi poemo troviĝas interalie ankaŭ en la reta kolekto “Gutenberg.Spiegel” sub [http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&x\\_d=1136&kapitel=10&cHash=3da378c6dbfruehlin#gb\\_found](http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&x_d=1136&kapitel=10&cHash=3da378c6dbfruehlin#gb_found).

Traduko de la Germana poemo “Frühlingsbotschaft” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, \*1911 – †1976).

Arg-527-1088 (2010-05-27 11:29:19)

El la poezia volumo “Kanzonoj de Heine”.

Traduko de la Germana poemo “Frühlingsbotschaft” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de Valentin Melnikov.

Arg-527-1044 (2010-03-15 17:53:18)

Tiu ĉi poem-esperantigo estas - kun permeso de s-ro Valentin Melnikov - prenita el ties reta kolekto <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov>. Vidu: <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov/Heine.html>. Vidu ankaŭ: <http://www.esperanto-mv.ru/Melnikov/index.html>.

Traduko de la Germana poemo “Frühlingsbotschaft” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (\*1847-02-16 – †1919) en 1908.

Arg-527-1045 (2010-03-14 15:53:26)

Tiu ĉi esperantigo de la poemo estas vere iom fuŝe tradukita. Ĝi aperis en programo de koncerto el la jaro 1908 (laŭ informo de la dana s-ano Lars Kromann [lars.kromann@mail.dk]. Pri Ludwig Emil Meier rigardu ankaŭ la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Emil\\_Meier](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier). Li verkis interalie la kant-libreton “Esperantista Kantaro”, kiu aperis en 1907 ĉe la Esperanta eldonejo de Hans Theodor Hoffmann en Berlino.